


LA JUNA VIVO

DUŝEMAJNA
ORGANO

POR LA
JUNULARO



Redakcio kaj Administrado:
West-Graafthijk (N.H.)
Nederlando.
Ĝironumero 209354 Nederlando.

Nederlando: jarabono f 0,75
1 ekz. f 0,03.
Aliaj landoj: jarabono f 1.00.
1 ekz. f 0,04.
(aŭ egalvaloro en aliaj valutoj)

Por Progresintoj.

FABELO PRI LABORO.

(daŭrigo)

(La fabelon pri laboro onklino rakontis al la infanoj de sia mortinta fratino, kiujn ŝi prizorgas.)

La infanoj streĉe aŭskultis la onklinon kaj kiam ŝi silentis, neniu diris ion.

Sed Wim demandis: „Kaj tiam, onklino?”

„Ne plu estas „kaj tiam”; mia fabelo finiĝis, infanoj.”

„Ĉu li post tio eklaboris?” demandis Jan.

„Certe jes,” respondis la onklino.

„Ĉu la objektoj el lia ĉambro nun neniam plu parolis al li?”

„Jes, sed alie ol tiam, kiam li mallaboris.”

Denove la infanoj silentis kaj ĉirkaŭrigardis en la ĉambro, kvazaŭ ĉiu objekto ricevis novan signifon por ili.

„Kiel strange, onklino, kiam oni pensas pri tio, ke oni sidas meze inter laboro,” diris Bets.

„Kun ĉiu peco da pano fakte peco da laboro venas en la buŝon,” diris Kor.

„Kaj trinkante lakton, vi fakte trinkas laboron,” diris la onklino.

„Onklino,” diris Jan, „labori estas io tre, tre bona, ĉu ne?”

„Jes, mia knabo, kaj ankaŭ io tre agrabla. Vidu infanoj, vi ankorau ne tiel bone povas kompreni tion, ĉar vi estas ankoraŭ tiel junaj. Sed mi, kiu estas pli aĝa, scias, ke la laboro estas tia bona amiko. Ĉiu plenaĝulo foje havas ĉagrenon,” diris la onklino per mallaŭta voĉo, kaj ŝiaj okuloj rigardis trans la infanojn, kvazaŭ ili

vidis ion tute en la malproksimo. „Sed tiam la laboro estas apogo, amiko, kiu helpas kaj konsolas. Pro tio jam frue vi ŝatu ĝin.”

„Onklino,” demandis la fratineto kun la grandaj, blujaj demandokuloj, „ĉu nia patro havis multan ĉagrenon, kiam nia panjo mortis?”

„Jes,” diris la onklino, dum ŝi prenis la knabineton sur siajn genuojn kaj kisis ŝin sur la eta, blonda kapeto, „jes multan, tre multan ĉagrenon kaj post tio li ankoraŭ pli senlace laboris ol antaŭe, por almenaŭ bone zorgi pri vi.”

„Ho, onklino,” diris Wim, la plej aĝa, subite senbride kore, „kiam mi estos granda, kaj nia patro estos maljuna kaj ne plu povos prizorgi nin, tiam mi laboros por la patro kaj vi.”

„Vi estas bona knabo,” diris la onklino, kaj ŝi pinĉis la dikajn vangojn de sia nevo.

„Sed mi ankaŭ donos multan monon,” diris Kor.

„Ankaŭ mi, ankaŭ mi,” diris la aliaj.

„Kiel feliĉaj ni estos tiam,” ridis la onklino. Se vi ĉiuj tiel bone prizorgos nin, tiam nun mi devas vin trodorloti. Kiu ŝatas ĉokoladon?”

Ĝojkriado de la infanoj. Kaj kiam ili manĝetis, Bets diris: „Onklino, tiu ĉi peco da laboro bonege gustas!”

Fino.

LA JARABONO ESTAS:

Aŭstrio	3.20 ŝil.	Germanujo	1.75 M.
Britujo	2.7 ŝil.	Hispanujo	5 pes.
Belgujo	15 fr.	Hungarujo	3.30 p.
Ĉeĥoslovakujo ..	16½ Ĉ. kr.	Latvujo	2. l.
Danujo	3 kr.	Norvegujo	2.7 kr.
Francojo	10 fr.	Polujo	3.6 zl.
Svislando	2. 10 fr.	Rumanujo	72 l.
U.S.A.	0.70 dol.	Svedujo	2.70 kr.
Bulgarujo	58 lev.		

Bonvolu sendi la monon por „La Juna Vivo”:

Belgujo: Hendrik Rainson, Mechelen. Belga ĝironumero 335183.

Germanujo: Ewald Killmer, Schwabenweg 14, Wuppertal-Elberfeld. Germana ĝironumero. „Köln 104097”.

Hispanujo: S-ro Montserrat. Str. Provenza, 75, 2^o, 3^o. Barcelona.
Svedujo: John Karlsson. Hylinge Norrköping.

Francujo: S-ro Mathieu. Dyon 27, Place de la République, Cote d'or.

En la sekvanta numero ni metos plurajn adresojn. Abonu la gazeton baldaŭ, poste vi povas pagi.

TAMEN NE MALFELIĈA.

En la jaro 1880 naskiĝis en Tuskumbia Helen Keler. En tiu parto de Nord-Ameriko estas tre varme; tial la domoj havas grandajn fenestrojn kaj vastajn verandojn. La domo de la familio Keler nomiĝis: „Hederverdo”, ĉar ĝi estis tute surkreskita de hedero.

Kiam H. estis unujara, ŝi etendis la manojn al ĉiuj floroj en la ĝardeno, ĉar ŝi vidis kiel ĉiuj aliaj infanoj. H. ankaŭ aŭdis la birdojn, kiuj kantis sur la arboj kaj ŝi aŭskultis la voĉon de la patrino, same kiel aliaj infanoj.

Helen havis deknaŭ monatojn, kiam ŝi grave malsaniĝis kaj la kuracisto timis, ke ŝi mortos. Sed subite la febro malaperis same mistere, kiel ĝi venis. Kiel ĝojaj estis la gepatroj Keler! Ili ankoraŭ ne sciis, ke ilia filineto fariĝis blinda kaj surda. Dum la unuaj tagoj post sia malsano Helen supozis, ke estas ankoraŭ nokto, ĉar estas tiel mallume kaj silente. Sed kiam restis mallume kaj silente, ŝi kutimiĝis al tio, kaj fine ŝi forgesis, ke estis iam alie.

Kiam la patrino tenis pupon antaŭ ŝi, Helen ne ekkaptis ĝin; kiam la patro parolis al ŝi, H. ne respondis. Nur kiam la patrino karesis la molajn vangetojn, Helen ekridetis. Tiel ŝiaj gepatroj komprenis, ke ŝi ne plu povas vidi kaj ne plu aŭdi. Kompetentaj kuracistoj esploris ŝiajn okulojn kaj orelojn, sed ili ĉiuj diris: „Nenio povas helpi.”

Tiel H. kreskis en mallumo kaj silento. La kelkajn vortojn, kiujn ŝi parolis antaŭ la malsano, ŝi mallernis, ĉar ŝi ne aŭdis paroli aliajn. Nur *akvo* ŝi ankoraŭ diris. Sed tiu vorto pli kaj pli malklariĝis kaj fine ĝi nur estis: „ak, ak”. Ŝi komencis fari ĉiajn gestojn, por komprenigi tion, kion ŝi deziras. Tirante ies vestojn, ŝi volis diri: „Venu”.

Puŝante iun, ŝi celis: „Iru for”. La patrino ankaŭ parolis kun sia filineto per signoj. Sed kiel malfeliĉa estis Helen, kiam oni ne tuj komprenis ŝin! Ŝi tre koleriĝis, ŝi piedbatis kaj kriegis pro kolero.

Helen estis sesjara knabino, kiam ŝi ekhavis fratineton. La infaneto kuŝis en la lulilo, en kiu H. ĝis nun ĉiam kuŝigis siajn pupojn. Pro kolero ŝi volis renversi la lulilon. Si estis tre ĵaluza pro la infaneto, kiu ĉiam kuŝis sur la sino de la patrino, kiam ŝi volis sidi tie. Tamen ŝi pli kaj pli ĝojis pro la fratineton, kaj admire palpis la etan vizaĝon kaj la dikmolajn braketojn.

„Estas tempo, ke Helen iom lernas, ŝi ĝenas pro enuo”, diris ŝiaj gepatroj, kiam ŝi estis sepjara. Sed kiel H. lernus? En Tuskumbia ne estis lernejo por surdaj aŭ blindaj infanoj. Feliĉe oni trovis instruistinon, kiu volis enloĝi ĉe la familio. Tiu instruistino estis fraŭlino Sullivan.

La trian de Marto 1887 H. staris dezirplene sur la perono. Per la signoj de la patrino ŝi komprenis, ke oni atendas iun. Ŝi bone sciis, ke gastoj ordinare kunportas ion por ŝi, kaj ŝi treege ŝatis bongustaĵojn. Tuj kiam ŝi sentis la alproksimiĝantajn paŝojn, ŝi kuris al fraŭlino S., palpis ŝian vizaĝon kaj robon, ekprenis ŝian valizon, kiun ŝi perforte volis malfermi.

La sekvantan tagon fraŭlino S. donis pupon al H. kaj skribis en ŝian manon: pupo. Tiu amuza ludeto plaĉis al H. kaj ŝi imitis ĝin. Sed ŝi ne sciis, ke tiuj movetoj en ŝia unu maneton rilatas al la pupo, kiun ŝi tenas en la alia mano. Nur post pluraj semajnoj ŝi ekkomprenis tion. Iun posttagmezon fraŭlino S. kunprenis ŝin al la pumpejo. Dum H. tenis ŝian manon sub la ŝpruco kaj sentis la akvon, fluante sur ĝin, fraŭlino S. silabis en la alian maneton: „akvo”, komence malrapide, poste pli rapide. Subite H. ekhaltis surprizite. Esprimo de kompreno venis sur ŝian vizaĝon. Si eksentis, kvazaŭ ŝi rememoris ion, kion ŝi longe forgesis. Post jaroj ŝi rakontis tion. Ŝi ja povis diri: „akvon” antaŭ ol ŝi malsaniĝis? Do akvo estis la nomo de la malvarmeta fluidaĵo, kiu fluis sur ŝian manon? Kiam H. ekkomprenis, ke ĉiu objekto havas nomon, ŝi estis fervorplena por scii la nomon de ĉio. Kaj kiam ŝi vespere kuŝis en la lito, ŝi unufoje en sia vivo sopiris al la nova tago, ĉar ŝi deziris multe lerni. Fraŭlino S. kunprenis ŝin eksteren kaj igis palpi al ŝi ĉion: florojn, kreskaĵojn, lanugajn kokidojn, glatajn ranojn, rapidajn akridojn kaj pri tiuj ŝi multe rakontis, silabante la literojn en la manon de H. Tiam H. faris demandojn, kiujn ŝi skribis en la manon de fraŭlino S., ĉar ŝi ankoraŭ ne povis paroli.

Poste ŝi lernis tion, metante la fingrojn sur la vizaĝon de la homoj, kiuj parolis, tiel palpante kiel la lipoj movas sin. Kaj ŝi imitis tion.

Tuj kiam ŝi povis silabi kelkajn vortojn, ŝi ricevis literojn el kartono kies formon ŝi klare povis palpi. Kiam ŝi lernis silabi: pupo estas en la lito, tiam ŝi metis la pupon en la liton. Kiam ŝi lernis silabi: knabino estas en vestŝranko, tiam ŝi momenton staris en la ŝranko.

Kiam ŝi flue povis legi, ŝi ricevis librojn, kiuj estas tiel presitaj, ke oni povas palpi la literojn. „La Malgranda Lordo” kaj „Sub la patrinajflugiloj” ŝi trovis eksterordinare belaj. Ŝi ankaŭ lernis legi la biblion. Kaj kiel ŝi lernis geografion? La plej bela atlaso ne povis helpi ŝin. Tial fraŭlino S. kunprenis ŝin al la bordo de la Tenisse, la rivero, kiu fluas preter Tuskumbia. Tie ŝi helpis konstrui al H. digetojn el ŝtonoj; tiuj estis la montoj; kaj per la fosado de kavoj kaj kanaloj H. ekkonis lagojn kaj riverojn. Tiel ili faris sur la tero kompletajn landkartojn, kiujn H. povis palpi.

Je sia deksesa jaro H. iris al knabinlernejo. Kaj post kelkaj jaroj ŝi iĝis studentino. Fraŭlino S. devis ĉeesti ĉiujn lecionojn, ĉar ŝi aŭdis anstataŭ H. Poste ŝi skribis tion, kion la profesoro diris, en la manon de H.

Skribadon Helen lernis per skribmaŝino. Ŝi verkis per tio sian biografion, kiu antaŭ kelkaj jaroj estis presita. Poste la verketo „Optimismo” aperis. En tiu ŝi diras: „Nun, kiam mia studtempo estas finiĝanta, mi rigardas kun batanta koro kaj belaj esperoj la taskon, kiun la estonto destinas por mi. Mia parto en la mondlaboro estu limigita, la fakto, ke ĝi estas laboro, igas ĝin kara; kaj mi ĝojas pri tio, ke aliaj povas fari tion, kion mi ne povas”. Ĉu vi sentas, kiel bela tio estas? Helen certe estas sen memamo por povi diri honeste tion. Ĉar ni ĉiuj bone scias, kiel malfacile ni ĝojas pri tio, kion aliaj havas, kaj ni malhavas. Ĉu vi estis ĝoja, kiam via fratineto iris al festeto, al kiu vi ankaŭ estus irinta, se vi ne ĵus estus malvarmiĝinta? Ĉu vi ne trovis domaĝe, ke ŝi povas iri, dum vi devas resti hejme? Aŭ ĉu vi estis kontenta, ĉar ŝi havis tiun plezuron? Ion tian Helen Keler faris, kiam ŝi ekhavis malkontentajn pensojn, ĉar ŝi ne povis vidi kaj aŭdi. Kaj tiel la antaŭa silenta mallumeco ŝanĝiĝis en hela ĝojiga mondo, kie gajaj sonoj resonas, kaj en kiu ankaŭ loko estas por ŝi, ĉar ŝi povas doni kaj ricevi amon.

Estas nur la reciproka amo, kiu feliĉigas la homojn.

Amsterdam

C. v. T.

ROZOJ SUR MIA ĈAPELO. (POPOLDANCO)

POR KI - U MI KO - LEK-TOS RO-ZOJN, BE-LAJN
 RO - ZOJN? RU - ĜAJ RO-ZOJ KUN O - DO-RO BEL-AS-
 PEK-TAJ PRO L'KOLORO, RO-ZOJ SUR ĈA-PE-LO.

ROZOJ SUR MIA ĈAPELO. (popoldanco)

1.

Por kiu mi kolektos rozojn, belajn rozojn?
 Ruĝaj rozoj kun odoro
 Bel' aspektaj pro l' koloro
 Rozoj sur ĉapelo.

2.

Al kiu fari riverencon, riverencon?
 Ruĝaj rozoj k.t.p.

3.

Al kiu premi la maneton, la maneton?
 Ruĝaj rozoj k.t.p.

4.

Al kiu doni mian koron, mian koron?
 Ruĝaj rozoj k.t.p.

5.

Kiun elserĉi por dancado, por dancado?
 Ruĝaj rozoj k.t.p.

1. La dancrondo turniĝas maldekstren, malgranda interna rondo el buboj dekstren.
2. Ĉiu bubo faras al knabino el la ekstera rondo riverencon kaj fermas kun la aliaj ree la internan rondon.
3. Ĉiu bubo prenas al iu knabino la manon kaj ree fermas la internan rondon.
4. Ĉiu bubo metas la manon sur la koron, farante riverencon antaŭ unu el la knabinoj, kaj ree fermas kiel antaŭe.
5. Ĉiu bubo prenas knabinon por dancado.

Germanujo.

Trad. Wuppertalano.

ENIGMOJ.

1. Mi estas en la preĝejo, sed mi ne estas en la preĝo.
2. Mi estas en la kateto, mi ne estas en la kato.
3. Mi estas en la sablero, mi ne estas en la sablo.
4. Mi estas akva besto, kiu somere laŭte kantas, en la nokto. Forprenu mian kapon, kaj vi havos personon.
5. Mi kreskas sur via kapo, sed mi estas nur unu el la amaso. Forprenu mian kapon kaj vi havos grandan grupon.

Amsterdam

C. v. T.

ENIGMO.

0	0	0	0	0	0
0	0	0	0	0	0
0	0	0	0	0	0
0	0	0	0	0	0
0	0	0	0	0	0
0	0	0	0	0	0

Jen estas 36 nuloj. Forstrecku 12 nulojn, sed tiel, ke en ĉiu vertikala kaj horizontala vico restos egala nombro.

Nikolajev (Ukraino), Sovetio.

SMUNIS.

KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

1. Hendrika van Tusschenbroek permesis al ni traduki ĉiujn infankantojn de „Goeien avond speelman.”
2. Aperis artikoloj pri nia gazeto en „Austria Esperantisto”, „Svenska Arbetar Esperantisten”. „Svenska Esperanto Tidningen La Espero”. „Informilo de Zamenhof-Instituto”, en Barcelona kaj en la revuo de la Ĉeĥo-Slovakaj instruistoj (Praha).
3. Ĉiuj numeroj restas aĉeteblaj. La duoblaj numeroj kostas la duoblan prezon.
No. 2 estas ankaŭ duobla numero.
4. Por la kunlaborantoj.
Ĉis nun ni ricevis el aliaj landoj preskaŭ nur rakontojn de nemodernaj verkistoj. Ni tamen preferas lekturon de nuntempaj verkistoj.

ANEKDOTO.

Kara leganto, vi sendube aŭdis paroli pri la fama spritulo „Tyl Uilenspiegel.” Multaj anekdotoj pri li vivas ankoraŭ ĉe la homoj. Unu el ili mi volas rakonti al vi:

Iun tagon Uilenspiegel preterpasis trinkejon. Li havis malplenan stomakon kaj ankoraŭ pli malplenan monujon. La mastro de la trinkejo staris apud la pordo. Uilenspiegel tuj vidis, ke tiu viro ne apartenas al la plej inteligentaj kaj intencis tikli la palaton sen elspezoj.

Li eksidis sur seĝon kaj ordonis glason da vino. La mastro obeis kaj iris por pretigi la glason. Dume Uilenspiegel flaris, ke oni bakas kolbasetojn en la kuirejo. Kiam la mastro metis la glason sur la tablon, Uilenspiegel diris: „Prenu ĉi tiun glason for de mi, kaj alportu kolbaseton anstataŭ la vino.”

La mastro faris tion. Uilenspiegel manĝis la kolbason kun bonega apetito kaj volis tiam foriri. La mastro frapis lin sur ŝultro kaj diris: „Vi devas pagi la kolbason!” „Ho ne,” respondis Uilenspiegel, „mi donis la vinon por la kolbaso!” „Jes, sed vi ankaŭ ne pagis la vinon!” rediris la mastro. „Estas kompreneble, mi ne trinkis ĝin,” diris la spritulo kaj post ĉi tiuj paroloj li foriris kaj lasis la mastron en la plej granda konfuzo.

F. WEEKE.

Den Haag, Nederlando.

LA DANA FABELVERKISTO H. C. ANDERSEN.

El ĉiuj fabelverkistoj en la mondo la dana H. C. Andersen estas la plej fama. Oni tradukis kaj tradukas liajn fabelojn en multajn lingvojn. Kiam li fariĝis 50-jara, oni transdonis al li lian plej belan kaj seriozan fabelon „La rakonto pri patrino”, tradukitan en 15 lingvojn.

Pri lia vivo, kiu ankaŭ preskaŭ estas fabelo, oni en dana legolibro povas legi la jenan:

H. C. Andersen naskiĝis en la dana urbo Odense, kiel filo de tre malriĉa ŝuisto, kiu baldaŭ mortis. La vidvino fariĝis pli malriĉa ol antaŭe kaj devis ĉiutage forlasi sian knabon por labori. Kiam do la knabo sidis sola, li tre ofte pensis pri tiu tempo, kiam lia patro vivis, rakontis belajn historiojn kaj faris interesajn ludilojn, precipe malgrandan teatron. Li neniam enuis, sed ofte sidis dum longa tempo kun fermitaj okuloj kaj „vidis”, kiel ĉio ĉirkaŭ li fariĝas vivanta, parolas kun li, agas, k.t.p. Aliajn knabojn li timis, ĉar ili mokis lin: „Li estas stranga, li ne volas ludi kiel ni!” Li sentis sin plej bone sola, aŭ ĉe sia bonega patrino.

Kiam li fariĝis sufiĉe aĝa, lia patrino proponis, ke li fariĝu tajloro, sed la 14-jara knabo ne ŝatis tiun profesion; li revis, ke li anstataŭe fariĝu grava kaj mondfama homo. „Antaŭe oni toleru kaj suferu multege, poste oni fariĝos mondfama!” li diris.

Lia patrino vizitis antaŭdiristinon por demandi, kiel la knabo fartus, se li irus al Kopenhago (la dana ĉefurbo). La antaŭdiristino diris, ke li vere iam estos grava persono, pro kiu oni iluminos lian naskiĝurbon, Odense.

Post tio kaj pro tio li ricevis permeson iri al Kopenhago por trovi la feliĉon. Li mem estis tre ĝoja, sed la patrino ploris, kiam la ŝipo foriris kun ŝia sola karulo en la mondo. Kiam li venis sur la akvon, li tamen iomete komencis timi, fleksis siajn genuojn kaj preĝis al Dio pri helpo.

Baldaŭ li alvenis en Kopenhago; sed li estis tro juna kaj kredema, li fidis je ĉiuj kaj ĉio. En stranga, malnova kaj malmoderna vesto, li vizitis la kopenhagajn geaktorojn kaj petis ilian helpon por fariĝi aktoro. Li unufoje prezentis sian povon al fama dancistino: li demetis siajn botojn, svingis sian ĉapelon, dancis kaj kantis laŭtege. La dancistino opiniis, ke li estas freneza kaj forpelis lin anstataŭ helpi lin. Similan li ofte travivis, ĉar li mem ne komprenis, ke liaj konduto kaj aspekto estis tiel strangaj, kaj ke ĝuste pro tiuj oni mokis lin.

Tamen en Kopenhago estis homoj, kiuj helpis lin, pagis por li la kotizon por kantinstruado. Sed lia malriĉeco malhelpis; li ne havis sufiĉe bonajn vestojn kaj botojn por la malvarma, malseka vintra vetero, fariĝis malsana kaj lia voĉo detruigis por ĉiam. Liaj amikoj proponis, ke li reiros al Odense, sed li ploris kaj denove preĝis al Dio pri helpo.

Vere la helpo venis: maljuna sinjoro promesis pagi por li, se li volus viziti gimnazion. Kaj li nun, kiel 18-jara junulo komencis la plej teruran parton de sia vivo. Li nenion lernis antaŭe kaj tial li devis lerni kune kun la plej malgrandaj knaboj en la lernejo. Tio suferigis lin terure, kaj eĉ la rektoro mokis lin preskaŭ ĉiutage.

Post 5 dolorplenaj jaroj li finis sian studadon per ekzameno kaj tre ĝoja li forlasis la gimnazion. Nun li vere komencis vivi! Li skribis pri la miloj da pensoj, kiuj okupis lin de lia infanaĝo. Li verkis tiujn fabelojn, kiuj igis lin mondfama. La temoj de la fabeloj estas simplaj; ofte liaj propraj travivaĵoj. Sed li kapablis rakonti pri ĉiaj temoj tiel, ke li samtempe trafis la homajn strangaĵojn. Kaj li ankaŭ havis la gravan povon, rakonti tiel, ke infanoj kaj plenaĝuloj same, povas ĝui kaj senti: „Tion li rakontis speciale por mi.”

Post kelkaj jaroj la nomo de H. C. Andersen flugis al ĉiuj landoj; li ofte vizitis fremdajn reĝojn kaj ĉie oni multe honoris lin.

Kiam li kiel maljuna viro vizitis sian naskiĝurbon, Odense, oni vere iluminis ĝin je lia honoro. La malriĉa, stranga knabo, kiun la lernejaj infanoj mokis, fariĝis la plej konata dana verkisto.

En la tuta mondo oni nun kun granda ĝojo legas liajn fabelojn. Pri si mem li verkis la fabelon „La malbela anasido”, pri sia patrino, kiun li tre amis, li verkis: „Si ne taŭgis!”

Galtrup, Danujo.

MARIE JENSEN.

EN GASTEJO.

„Ĉu vi havas fiŝaĵon?”

„Nur vendrede, sed ni havas neokupitan ĉambron. Ĉu vi volas atendi?”

Nanterre, Francujo.

R. M.

ARANEO KAJ FORMIKO.

Foje paŝtistetoj manĝis panon en arbaro kaj unu peceto rompiĝis kaj falis teren. Araneo, kiu ekvidis panon sur la tero, baldaŭ kaptis ĝin kaj „kabaraj, kabaraj!” leviĝis al la ĉielo ĉe Sinjoro Dio.

„Sinjoro, ne plu donu,” ĝi diris, „al la paŝtistetoj panon! Vidu, la tero estis plena de tiaj disĵetitaj pecoj! Por atingi vin, mi tiel rapidis, ke mi preskaŭ mortis!”

Formiko, kiu ekvidis, kion la araneo faras, komencis peli ĝin kaj tiel rapidis, ke ĝi pro la kurado trolaciĝis kaj maldikiĝis. Kurinte al la ĉielo, ĝi trovis la araneon jam plendanta. Tiam ĝi denove rakontis al la Sinjoro Dio, por ke li ne aŭskultu la araneon: „La paŝtistetoj nur senintence forĵetis unu peceton, la araneo troigas...”

Sinjoro Dio koleriĝis je la araneo kaj batis ĝin per pugno sur la dorso tiel, ke eĉ ĝibo elsaltis. Al la paŝtistetoj li ordonis, ke ili ne detruu la formikejojn.

Iŝlauzas, Litovio.

El litovaj fabeloj trad. A. P.

POR KOMENCANTOJ!

SEKRETA LINGVO.

Matiaso kaj Andreo sidis kune en unu benko. Foje Matiaso demandis Andreon: „Kiom da pomoj vi havas?”


„**Star**,” respondis Andreo. „Hieraŭ mi havis **efta**.”

Aliaj knaboj sciis nek kiom da pomoj havas Andreo, nek kiom havas Matiaso.

Andreo kaj Matiaso longe ne malkovris sian sekreton kaj ĉiujn nombrojn ili diris en tiu sekreta lingvo. Sed fine Joĉjo Huŝtjava divenis, ke ili interparolas cigane. Poste Joĉjo instruis ĉi tiun lingvon al ĉiuj knaboj kaj tiel ili malkovris, ke 1 estas jek, 2 estas dui, 3 estas trin, 4 estas ŝtar, 5 estas panĝ, 6 estas ŝov, 7 estas eŝta, 8 estas oĥto, 9 estas enja, 10 estas deŝ. Tiam la lingvo ne plu estis sekreta.

Turĉiansky Sv. Martin, Ĉeĥoslovakujo.

Trad. de J. V. DOLINSKY.



LA TRIA LECIONO.

- | | |
|-------------------|-----------------|
| 1. land-karto. | 13. domo. |
| 2. lecion-tabelo. | 14. pordo. |
| 3. kalendaro. | 15. kretoj. |
| 4. spongo. | 16. viŝ-tuko. |
| 5. krano. | 17. viro. |
| 6. lav-kuvo. | 18. virino. |
| 7. inko. | 19. knabo. |
| 8. kajero. | 20. knabino. |
| 9. benko. | 21. fraŭlino. |
| 10. krajono. | 22. tabulo. |
| 11. plumo. | 23. kret-kesto. |
| 12. termometro. | |

EN LA KLASO.

1. **Hodiaŭ** estas **sabato**.
2. Karlo estas en la **lernejo**.
3. Karlo staras antaŭ la **klaso**.
4. **Ĉe** Karlo estas la fraŭlino.
5. Sur la muro pendas **granda** landkarto kaj **nigra** tabulo.
6. Sur la muro ankaŭ estas lavkuvo kaj krano **kun** spongo.
7. Sur la muro pendas kretkesto **kun** kretoj, kaj **tie** pendas ankaŭ viŝtuko.
9. Sur la benko **kuŝas** kajero, krajono kaj plumo.
10. La fraŭlino: „**Kie** staras **vi**?”
11. Karlo: „**Mi** staras **ĉe vi**.”
12. La fraŭlino: „Kio estas sur la tabulo?”
13. Karlo: „Sur la tabulo estas domo **kun** pordo, kaj **tie** estas ankaŭ homoj. **Tie** estas viro **kun** virino kaj knabo **kun** knabino.
14. La fraŭlino: „Kio pendas sur la muro?”
15. Karlo: „Sur la muro pendas la landkarto, kaj tie pendas ankaŭ la leciontabelo kaj la kalendaro.”
16. La fraŭlino: „Kio pendas **ĉe** la tabulo?”
17. Karlo: „**Ĉe** la tabulo pendas la termometro.”
18. La fraŭlino: „Kio kuŝas sur la benko?”
19. Karlo: „Sur la benko kuŝas la kajero, la krajono kaj la plumo.”
20. Karlo estas **bona** knabo!

- A. Traduku la frazojn en vian gepatran lingvon.
 B. Post kelkaj tagoj traduku la frazojn en esperanton.
 C. Respondu al la demandoj:

- | | |
|--------------------------------|---|
| 1. Kio estas hodiaŭ? | 13. Kie estas la hundo? |
| 2. Kie estas Karlo? | 14. Kie pendas la granda landkarto? |
| 3. Kie staras Karlo? | 15. Kio estas ĉe la fenestro? |
| 4. Kio pendas sur la muro? | 16. Kio estas tio? (La instruisto povas fari multajn demandajn frazojn, kiujn la infanoj jam lernis. Li demandas ekzemple: „Kio kuŝas sur la benko?” La infanoj respondas ĥore aŭ unuope per kompletaj frazoj.) |
| 5. Kio estas sur la tabulo? | |
| 6. Kio kuŝas sur la benko? | |
| 7. Kio staras sur la planko? | |
| 8. Kio pendas ĉe la tabulo? | |
| 9. Kio estas ĉe la lavkuvo? | |
| 10. Kie estas la viro? | |
| 11. Kio estas en la botelo? | |
| 12. Kio estas en la kretkesto? | |

HIGIENA TRINKO.

Sinjoro promenis dum longa tempo. La vetero estis bela, sed tre varma. Laca kaj soifa li iris sur la suna vojo. Li fine ekvidis simplan benkon antaŭ malgranda domo de kamparano kaj eksidis.

Post kelka tempo aperis la virino, kiu loĝis tie. La sinjoro ĝentile salutis kaj petis al ŝi: „Ĉu vi havas iom da lakto por mi, kara virino? Mi tre soifas!”

La virino foriris en la domon. Baldaŭ ŝi denove aperis kaj tenis en la mano malnovan pladon kun lakto. La sinjoro gaje ridetis, prenis la pladon kaj trinkis avide!

Subite alkuris granda hundo, kiu haltis antaŭ li kaj laŭte bojis. La besto ŝajnis tre kolera kaj montris siajn dentojn!

La sinjoro ektimis kaj demandis al la virino: „Ĉu tiu hundo estas danĝera?”

La virino ridetis; ŝi skuis la kapon kaj diris: „Tute ne, sinjoro, sed mi opinias, ke la kara besto vidas, ke vi trinkas el ĝia plado kaj tion ĝi certe ne volas!”


Leeuwarden, Nederlando.

adapte tradukis B. R.

Legu kelkfoje „Higiena Trinko” kaj rakontu la enhavon en via esperanta rondo.

LA SUBSKRIBOJ DE LA BILDOJ.

1. Malobeaj knaboj.
2. Atentu, ne faru akcidenton.
3. Tie venas helpo.



Bonvolu rakonti la enhavon de ĉi tiuj tri bildoj.

Sendu la leterojn al: Cornelia van Tusschenbroek. Minervalaan
39 hs. Amsterdam. Nederlando.

El: „T. van den Brink en Th. Lancée, Onze eigen taal”, J. B. Wolters,
Groningen-Den Haag-Batavia.

REKLAMTARIFO:

I paĝo: 20 gld.; ½ paĝo: 11 gld.; ¼ paĝo: 6 gld.; ⅛ paĝo: 3,5 gld.;
1/16 paĝo: 2 gld.



„FLORETOJ”
Porinfanaj Rakontoj
tradukitaj de la
„VENDREDA KLUBO”
en Winschoten
(Nederlando)

Kun multaj koloraj kaj nigraj
bildoj
de C. Jetses
prezo 0.70 ned. guld.

KORESPOND-ADRESOJ:
ĉiu vorto: 0.03 gld.

Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la
eldonisto:

J. B. WOLTERS

Groningen — Den Haag
Batavia.

La Plej Granda Utileco de Esperanto

estas ke per ĝi ni povas ekkoni la vivon de malproksimaj
popoloj, kies lingvoj estas tute malsamaj de la eŭropaj.
Ekkonu pliprofunde la kulturon de Japanujo, la lando
de la **Leviĝanta Suno** kaj la novan spiritan movadon
Oomoto!

PETU SPECIMENON de la esperanta, ilustrita, monata,
riĉenhava gazeto, al:

„OOMOTO INTERNACIA”

Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.